

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk




Fondita 1952

Numero 5

novembro/decembro 1990



Komunan aŭtunan kunvenon 1990



Spa la perlo de la Ardenoj

Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco estis sukcesplena

En tiu jaro pluraj landaj asocioj de IFEF rezignis pri naciaj jarkunvenoj. Belgaj, britaj, francaj, germanaj kaj nederlandaj gekolegoj decidis organizi komunan aŭtunan kunvenon. Tiu ĉi portis la pretendeman nomon „Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco“ kaj disvolviĝis de la 1a ĝis la 7a de oktobro 1990 en la belga kuraĉloko Spa. Kiel kongresejo kaj loĝejo servis la feria centro Sol Cress situanta sur altaĵo de la ĉirkaŭa Venn-montaro. Dekomence estis evidente, ke tiu konferenco ne celis konkuri kun tradicia IFEF-kongreso aŭ establiĝi novan formon de libertempo. La semajno altiris pli ol 120 esperantistojn el 12 landoj, eble ne sufiĉe kiel atendite, sed ĉiuj partoprenis en eksterordinara alloga programo. Ne mirige, ke bona etoso regis dum tiu semajno, en kiu la suno ofte prilumis la ĉirkaŭajn aŭtunajn arbarojn.

La fervojfakan parton de la konferenco estis transpreninta Dieter Hartig (D). Elokvente li referis pri „La eŭropa merkato 1992 kaj la fervojo“. Ŝajnas, ke la ekonomiaj ŝancoj de la fervojo ne estos favoraj pro la kreskanta aŭtomobiltrafiko. Hartig krome raportis pri la estontaj laboroj de la Terminara Komisiono de IFEF. Post la eldono de la terminaro kiel esperantlingva suplemento al la UIC-leksikono sekvos sur tiu bazo la naciaj vortaroj. Lia alia prelego okupiĝis pri internaciaj ligoj en politiko, ekonomio kaj precipe inter la fervojoj. La konkludo de tiu referaĵo estis superi lingvajn barilojn kaj iliajn altajn kostojn per enkonduko de Esperanto. Alan Burgess, la ĉiam humura brita kolego, raportis en diaprelego pri „La elektrizado de la orienta marborda ĉef-fervojo inter London kaj Edinburĝ“.

Pri la kulturaj programoj respondecis diverslandaj gekolegoj. Belgio kontribuis per la profesia kantistino Nikolin kun sia gurdo. Ŝiaj ĉarmaj, sentimentalaj kanzonoj, precipe el la regiono de Paris, treege plezurigis la aŭskultantojn. La nederlandino Gerry Schavemaker gajnis la korojn per modernaj kantoj kaj krome per trumpetaj muzikaĵoj. S-ino Béby Kohl (L) kaj s-ro Ludwig Fluck (D) prezentis, parte en dueto, altnivelan belsonan programon kun kantoj el operoj kaj operetoj. La ĉeestantoj entuziasmiĝis. Menciindas, ke GEFA-prezidanto Achim Gießner modele estis trakinta ĉiujn kantotekstojn. Multe imponis koncerto de la granda nederlanda blorokestro. Ĉiuj estis fervojistoj, ilia repertuaro estis multampleksa. Je la semajnfino la orkestro ankaŭ ludis publike en la urbo. Unu vespero estas dediĉita al folkloraj dancoj. La paroj tiom ĝojis, ke ili stimulis la spektantojn danci kun ili. Interesa estis videofilmo de la Nederlandaj Fervojoj, en kiu tiuj prezentis sin kiel modernan transportentreprenon. Amatoran sonfilmon pri Norvegio montris Willi Barnickel (D), kaj pri la 100jara jubileo de Esperanto en Pollando memorigis sonfilmo de Joseph Laenen (B).

Sufiĉe granda estis la oferto de turistaj aranĝoj. Oni konatiĝis kompreneble kun la gastiganta urbo Spa, ĝuis la sanigan mineralakvon, kiun eltrovis jam romiaj soldatoj, kaj admiris konstruaĵojn en la stilo de la pasinta jarcento. Luksemburgo estis celo de tuttuga ekskurso. Bedaŭrinde ne estis multe da tempo por viziti vidindaĵojn. Elektita tagmanĝo en la stacidoma restoracio drolotis la ekskursanojn. En la direkcio de la Luksemburgaj Fervojoj (CFL) s-ro Schmitt, prezidanto de la Federacia Internacia de Kulturflgantaj Fervojistoj (FISAIC), bonvenigis la ĉeestantoj alte taksante la laboron de la fervojistaj esperantistoj. Li atentigis pri la venonta 40jara jubileo de FISAIC. La esperita fondiĝo de luksemburga IFEF-sekcio ne efektiviĝis pro malmultaj esperantistoj. Sur la vojo reen oni vizitis en Bastogne la monumenton, kiu memorigas pri la bataloj 1945 en la Ardenoj inter usonaj kaj germanaj soldatoj. Sur grandaj kolonoj estas enĉizitaj la tiamaj eventoj.

Alia aŭtobusekskurso kondukis al Lessive. Tie troviĝas la centro por telekomunikado. Gigantaj pladosimilaj antenoj ebligas la ligojn kun eksterteraj satelitoj. La vizitantoj spektis videofilmon, kiu demonstris la funkciadon de tiu ampleksa instalaĵo. Kiam jam vesperiĝis, la aŭtobusoj haltis en Durbuy, la plej malgranda urbetino de Belgio. La romantika loko situas malsupre de krutaj montoj. Por la tria ekskurso necesis transpasi la landlimon inter Belgio kaj Germanio. La aŭtobusoj atingis la rave belan urbeton Monschau, kiun karakterizas kastelo sur kruda roko, trabfakaj domoj, mallarĝaj stratetoj, speciala kukaĵo en rustika kafejo kaj suvenirbutikoj. En la historia urbokerno de Aachen la ekskursantoj vizitis unuavice la katedralon; en ĝia 1200jara palatina kapelo ripozas en orumita sarkofago la imperiestro Karlo la Grandulo. Kafejoj ĉirkaŭ la impona urbodomo en gotika stilo invitis al paŭzo.

Tiu Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco havis multilate la nivelon kaj kvaliton de IFEF-kongreso. La kunlaboro de pluraj landaj asocioj por kontribui al la programo estis modela. Ke ĉiuj aranĝoj plene sukcesis, estis unuavice la merito de la belgaj geedzoj Lucien kaj Ada De Sutter. Al ili la partoprenintoj esprimis sian sinceran kaj koran dankon, kiam venis la adiaŭa horo de la gastama domo Sol Cress kun sia ĝentila servistaro.

W. B.

Konferenco de la Eisenbahner-Esperantistoj en Belgio

Die jara Herbsttagung fand vom 1. bis 7. Oktober 1990 im Rahmen der „Europäischen Eisenbahner-Esperanto-Konferenz“ im belgischen Badeort Spa statt. 120 Sprachfreunde aus 12 Ländern fanden sich in der Ferienanlage Sol Cress zu einer erlebnisreichen Woche zusammen.

Belgische Kollegen hatten die Ausrichtung der Konferenz übernommen, die unter der Schirmherrschaft des Internationalen Verbandes kulturpflegender Eisenbahner (FISAIC) stand. An der Programmgestaltung waren auch die Landesverbände von Frankreich, Großbritannien, den Niederlanden und Deutschland beteiligt. Die Teilnehmer verständigten sich untereinander mühelos in Esperanto. Sie erfuhren in Referaten, wie die Chancen der Eisenbahn ab 1992 beurteilt werden und welche hohen Kosten für Dolmetscher und Übersetzer in den zahlreichen internationalen Gremien erforderlich sind; sie könnten durch die Einführung der internationalen Sprache wesentlich gesenkt werden.

An mehreren Abenden erklangen Lieder, Schlager, Opernarien und Operettenduetten in Esperanto. Tonfilme über Norwegen, über das Esperanto-Jubiläum in Polen und über die

Niederländischen Eisenbahnen ergänzten das Veranstaltungsprogramm. Auch ein Folkloreabend fehlte nicht. Bei einem Busausflug nach Luxemburg begrüßte FISAIC-Präsident Schmitt herzlich die Teilnehmer. In Lessive bestaunte man das riesige Telekommunikationszentrum, das die Welt über Satellit verbindet. Das zauberhafte Städtchen Monschau und das historische Aachen waren weitere Ziele eines Ausflugs.

Dankbar verabschiedeten sich die deutschen Teilnehmer von ihren belgischen Gastgebern. Ein großes Blasorchester gab am Bahnhof Spa ein Konzert. Übrigens haben die tschechoslowakischen Kollegen bereits zum nächsten internationalen Esperanto-Kongress im Mai 1991 eingeladen. Im Oktober 1991 halten die deutschen Eisenbahner-Esperantisten ihr Jahrestreffen in Friedrichshafen ab. W. B.

Jarraporto

pri la periodo inter la 33a kaj 34a jarkunveno (1989/1990)

Enkonduko

Komence ni indiku, ke la 34a jarkunveno (30. 9. 1990 en Aachen) estis pure labora kunveno kaj ke GEFA poste partoprenis en la Eŭropa Fervoja Esperanto-Konferenco en Spa (Belgio) 1.-7. 10. 1990.

En la pasintjara enkonduko ni aparte menciis la finpretigon de la fervoja terminaro kaj ties prezentadon al IFEF. En la sama raporto en punkto 2 ni substrekis la decidan rolon de niaj kolegoj Ritterspach kaj Hartig rilate al tiu terminaro. Nun en la ĉi-jara enkonduko ni devas fonebre raportoj, ke Gernot Ritterspach ne plu estas inter la vivantaj, postlasante breĉon por ĉiam (vidu la nekrologojn en Bulteno 2/90 kaj IF 2/90). Tio estis la plej forta bato de la morto, kiu en tiu jaro nekutime ofte forprenis amikojn el niaj vicoj. Ritterspach ricevis en Hamar post morto la oran medalon de FISAIC pro siaj meritoj (ni jam jaron antaŭe estis pentintaj ĝin de FISAIC). Li estas la sola esperantisto, kiu ricevis arĝentan kaj oran medalojn.

Jen la nomoj de la mortintoj, pri kiuj ni eksciis:

Josef Ries	(69)	5. 5. 1989
Karl Simon	(93)	12. 8. 1989
Siegfried Bahlo	(63)	17. 10. 1989

Friedrich Busse	(85)	19. 11. 1989
d-ro Ortwin Brodt	(73)	27. 11. 1989
Heinrich Ladage	(56)	okt. 1989
Gernot Ritterspach	(60)	13. 1. 1990
Helga Knötzsch	(62)	febr. 1990
Heinrich Ross	(89)	6. 3. 1990
Hardo Wendt	(69)	13. 5. 1990

Ili ripozu en eterna paco.

Oficiale ni gratulis pro naskiĝtagoj al kolegoj Kiefer kaj Terjung (60), Lautenbach (65), Kaj Schindler (70).

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

La membronombro ankaŭ ĉi-jare denove malkreskis. Ne eblis egaligi la perdojn kaŭzitaĵojn de la morto. Al BSW ni anoncis 402 individuajn (pasintjare 431). Laŭ la anoncoj de la distriktkomisiitoj (Bba) GEFA entute perdis 33 membrojn kaj akiris 4 novajn. El tio ankaŭ estas ekkoneble, ke la ĉi-supra listo de mortintoj ne estas kompleta. Al IFEF ni pagis por 605 personoj inkl. korporacivajn membrojn. La ĝenerala persona politiko de DB daŭris, laŭ kiu la nombro de la personaro entute seninterrompe estas malplialtigata, kvankam pro akuta manko en kelkaj branĉoj (ĉefe manovristoj, lokomotivestroj) DB estis devigita dungi novajn kunlaborantojn, kies emo resti ne estas tro granda pro la malfavoraj laborkondiĉoj.

1.2 Kursoj

Ankaŭ rilate al kursoj la situacio neniel pliboniĝis. Memstare de fervojistoj organizitaj kursoj entute mankis. Nur en la distriktoj Essen kaj München eblis partopreni en lokaj kursoj, en kiuj finis entute 10 kursanoj. **Sed kie ili restis?** Nia telekurso daŭre funkcias, kvankam certa procentaĵo de la kursanoj ne trarastaras ĝin ĝis la fino. Ankaŭ „memorkampanjo“ ĉe tiuj „maldiligentuloj“ revokis nur kelkajn. Entute ĝis nun estas venditaj 256 ekzempleroj de la kurso.

Intertempe GEFA eldonis duan parton Esperanto-Fernkursus Teil II. Rezultoj ne jam estas konataj.

1.3 Funkciuloj

La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) laŭ deziro de BSW-ĉefestraro estas kompletigita per Siegfried Krüger, kiel oficiala anstataŭanto de la ĉefkomisiito Giessner. Tio estas precipe grava pro la venonta IFK '92 en Münster. Kunvenoj de la laborkonsilantaro kun la komisiito okazis en Verden (okt. 89) kaj Fulda (marto 90).

Pro la rigoraj organizaj ŝanĝoj de DB ne plu eblis distribui Bultenon kaj IF el de Schwelm. Anstataŭ Schindler, kiu dum multaj jaroj prizorgis tiun distribuadon en plej fidinda maniero, nun transprenis ĝin Heimlich sen. en Soltau. Al ambaŭ dankon pro ĉio farita kaj pro la preteco fari ĝin nun.

2. Kunlaboro kun IFEF

La 42a IFK okazis la 2an ĝis 8a de junio 1990 en Hamar (N) kun 393 kongresanoj el 21 landoj, inter ili 26 el niaj membroj. Kun ĝojo ni menciui, ke ĉi-foje la unuan fojon — eĉ pli multnombra — partoprenantaro el la teritorio de GDR povis ĉeesti. Ili venis per propra kuŝvagono kaj povis loĝi en ĝi. Krome venis entute pli ol 100 kongresanoj per kuŝvagonoj el CS, H kaj PL. Reprezentis nin la komitatanoj Herlitze, Riehn, Rösemann, Ullmann.

Demisiis post 22jara gvidado IFEF-prezidanto Giessner (D), novelektiĝis Per Engen (N). Konfirmata estas kasisto Hauge, tiel ke la nuna IFEF-estraro konsistas el Engen (N), Gulyas (H), d-ro Bolognesi (I), Hauge (DK), Olsen (DK). Gießner lastfoje partoprenis estrarkunvenon en Bruselo. Li ankaŭ helpis per konsilioj en Prago kaj Brno okaze de la preparado de la 43 IFK. Pro la morto de Ritterspach la Terminara Komisiono perdis sian gvidanton. En Hamar la ĉefkomitatano transprenis la gvida-

don kiel afergvidanto. Ĉe Hartig restas la pretigado de la Terminara Kuriero. Krome li laboras pri nacia terminaro surbaze de la ĵus aperinta fervoja terminaro.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 33a jarkunveno okazis de la 6a ĝis 8a de oktobro en Verden. Ĝin partoprenis 122 personoj, inter ili gastoj el 6 landoj. Kiel kutime ni provis vekti la intereson de lokaj ĵurnalistoj helpe de gazetara konferenco. La programo kiel ĉiam havis allogajn turismajn kaj kulturajn trajtojn apud la labora parto. Multaj membroj vizitis aliajn naciajn kaj internaciajn aranĝojn de IFEF-asocioj, GEA, UEA kaj la IFEF-skisemajnon en Sand en Taufers (Sudtirolo).

4. Informado

4.1 Bulteno

Helpe de la nova, tre moderne ekipita presejo Jungfer en Herzberg la eldonritmo povis esti certigita. Kiel kutime aperis 5 numeroj kun entute 36 paĝoj (9 fotoj).

4.2 Gazetaro, Radio

En tagaj gazetoj, fakaj kaj sindikataj revuoj ni povis konstati 91 artikolojn pri nia agado. Estas rekomendinde, multnombre eluzi tiun senkoston eblecon, konatigi la lingvon kaj ĝian utilon. Precipe inter fervojistoj ĉi-rilate gravas la „BSW-Mitteilungen“, kiuj aperas en preskaŭ ĉiuj DB-distriktoj. Ankaŭ „wir“ aperigas iam kaj tiam artikolon pri naj aranĝoj. GEFA-membroj sukcesis lanĉi 5 radioelsendojn en la hesia kaj bavara radioj, parte en formo de intervjuoj. Krome okazis 7 ekspozicioj kun proksimume 7.000 vizitantoj. En la DB-informilo „Inter-Rail“ daŭre troviĝas informoj pri „paŝporta-servo“.

5. Varbado

Kiel en pasintaj jaroj ni distribuis konsiderindan kvanton da inform- kaj varbmaterio. Laŭ anoncoj de la distriktoj tio estis entute 2.700 informiloj pri la lingvo kun adresoj, ĉefe distribuitaj en deforejoj, al unuopaj fervojistoj, ankaŭ survoje dum vojaĝoj al kunvojaĝantoj. Krome ĉirkaŭ 80 afiŝoj estis pendigitaj en deforejoj. Ĉiuj klopodoj, varbi junajn fervojistojn por la Internacia Lingvo, estis denove vanaj.

6. Emerituloj

Unuan fojon la jara renkontiĝo de la emerituloj okazis en printempo, kaj nome la 19an de aprilo en Fulda. Ĉeestis ĉi-foje

60 personoj, Kiel kutime Elfriede Kruse modele aranĝis la renkontiĝon, kiu denove konsiderinde kontribuis al la flegado de malnovaj amikaj kontaktoj.

Perspektivo

Mi ne emas, daŭre ripeti la samajn avertojn pri la danĝero, en kiu ŝvebas nia asocio GEFA. Sufiĉas indiki tie ĉi, ke ĉi-jare ni perdis 33 membrojn kaj gajnis 4 novajn. Sufiĉas memori je la batego, kiun ricevis GEFA pro la morto de Ritterspach. Sufiĉas atentigi je numero 2/90 de nia Bulteno, en kiu suŝ paĝoj du kaj tri bonvole relegi ĉion necesan pri nia situacio. Kaj

ne sufiĉas nur supraĵe legi tion, sed **necesas tuja agado**. Montru, ke fervojistaj esperantistoj ne nur parolas pri la lingvo kaj ĝuas ĝin, sed ankaŭ faras ion por ĝi. Kunhelpu, ke nia inform-kaj varbkampanjo en DB-Amtsblatt (vidu pkt. 5) fariĝos sukceso.

Ĉu la fakto, ke multaj el ni ne plu estas junaj, malhelpas, ke ni povos altiri novajn adeptojn kaj simpatiantojn? Mi diras, ke tiu fakto **ne** malhelpas. La tasko por ĉiu el ni estas klara. De ĝia plenumado aŭ neplenumado dependos la sorto de GEFA.

Giessner

El la grupoj BREMEN La unua postferia kunveno

Ĉiu reportu pri siaj feriaj travivaĵoj.

Ni kunvenis la unuan fojon post la feria sezono. Kunvenis nur 12 gemembroj; estis do eta, preskaŭ familia rondo sidanta ĉirkaŭ unu tablo.

S-ro Grebe malfermis la kunvenon. Li montris grandan foton pri nia grupo kune kun niaj gastoj el Rostock ĉirkaŭ la statuo de la Bremenaj Urbmuzikantoj. Sed — la bildo estis tro granda por nia ekspozicia kadro. Ni devas la bildon tondi en la sekvonta grupkunveno.

S-ro HEEREN transdonis fiere dikajn foliojn al la grupo temis pri lia viv-historio, kiun li en formo de historietoj rakontis. La titolo de lia verko estis 'de Aurich ĝis Baku'. Tiuj historietoj aperis en ĵurnaloj kiel sinsekvaj prezentadoj. Lia vojo kundukis lin de lia hejmurbo Aurich al (dum la milito) Baku. Ankaŭ Esperanto ludis gravan tre gravan rolon en liaj vivo kaj historietoj.

Jes, s-ro Heeren estas homo, kiu multon povas rakonti! Estas bone, ke li skribe fiksas tion.

Ĉiuj el la ĉeestantoj povis rakonti pri siaj ferio-travivaĵoj, kelkaj eĉ tiel interesaj, ke ili instigis al demandado kaj eble eĉ al imitado kaj planado.

Mi konstatis, ke niaj membroj tre ŝatas vojaĝi. Ekzemple al Norvegio! Plaste ni vidis la belan, iom malmildan, pejzaĝon kaj la pitoreskajn fjordojn. Aŭ la verda insulo Irlando. Kiu el ni ne estus volonte iam tie? Sed ni aŭdis ankaŭ pri la danĝera vivo tie pro la konstanta militado.

Iu el ni eĉ vivis inter Esperantistoj dum la ferio — kaj eĉ en la fama kastelo Gressillon en Francio. Li estas vere enviinda! Dum lia tiea

feriado estis gastoj el kvin nacioj en la Esperanto-Kastelo.

Kelkaj el ni utiligis ankaŭ la feriojn por ripozigi, migradi kaj eĉ por iom kuracadi. Aliaj veturis al parencoj en la okcidentan parton de nia lando. Ankaŭ tie oni povas multon travivi kaj multon raportu pri la tiea situacio.

Ni aŭdis multifacetan aktivecon. Kontentige ni konstatis, ke ĉiuj retrovis la vojon hejmen kaj travivis agrablan, interesan tempon.

Dieter Hartig

Esperantlingva fervojfaka statistiko

Sub la nomo „Indikoj pri Hungaraj Ŝtatafervojoj (MÁV)“ eldonis la Ekonomia Ĉefsekcio de la Generaldirekcio de MÁV, Népköztárság útja 73-75, H-1940 Budapeŝt 18paĝan koloran broŝuron en Esperanto, kiu entenas indikojn pri organiza strukturo, linioj, transportrezultoj, teknikaj-ekonomiaj indeksoj ktp. La broŝuro povas esti liverata de la ĉi supra adreso. W. B.

Neue Eisenbahnliteratur in Esperanto

Die „Einheitlichen Rechtsvorschriften für den Vertrag über die internationale Eisenbahnbeförderung von Gütern (CIM)“, herausgegeben vom Internationalen Eisenbahntransportkomitee in Bern und gültig für alle europäischen Bahnen, liegen nunmehr auch in Esperanto vor. Ihr Titel: Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de varoj (CIM)“. Preis, einschließlich Versandkosten: 9 DM. Lieferung gegen Vorauszahlung auf das Girokonto 953729 bei der Sparda-Bank Frankfurt (M), BLZ 500 905 00, Karl Bernhard, Sauerbruchstraße 8, 6700 Ludwigshafen mit dem Vermerk „CIM“.

FRANKFURT/MAIN Esperanto-Weltkongreß in Kuba mit mehr als 1.600 Teilnehmern

Delegierte aus 54 Ländern nahmen am 75. Esperanto-Weltkongreß Mitte Juli in Kubas Hauptstadt La Havanna teil. Sie diskutierten, wie trotz weltweiter, wirtschaftlicher Verflechtungen die kulturelle Vielfalt erhalten werden könne. Esperanto solle dabei eine wichtige Rolle spielen, weil es als neutrale Sprache für internationale Beziehungen nicht kleineren Ländern die Sprache der (wirtschaftlich) stärkeren Länder aufzwingt.

Der Kongreß wurde von der kubanischen Öffentlichkeit aufmerksam verfolgt. Täglich gab es viele Berichte in Presse und Rundfunk. Auch Kubas Staatschef Fidel Castro besuchte die Kongreß-Teilnehmer und zeigte sich beeindruckt von der internationalen Atmosphäre: Gäste aus 54 Ländern, die sich ohne jede Dolmetscher-Anlage verständigen.

An den Kongreß schloß sich für die meisten Teilnehmer ein touristisches Programm an, bei dem kubanische Esperantisten mitwirkten.

Im nächsten Jahr wird der Esperanto-Weltkongreß in Bergen in Norwegen stattfinden. (Auszug aus esperanto informationsdienst)

Egon Kiefer

Eisenbahn-Fachvorträge beim Esperanto- Weltkongreß 1990 in Havanna/Kuba

Als Mitglied der BSW-Esperanto-Gruppen des Bezirks Frankfurt (M) habe ich am 75. Esperanto-Weltkongreß teilgenommen, der in der Zeit vom 14. bis 21. Juli 1990 in Havanna/Kuba stattfand.

Am 17. Juli fand im Rahmen des Kongresses das schon traditionelle Eisenbahner-Treffen statt, bei dem ca. 30 Kolleginnen und Kollegen aus 15 Ländern anwesend waren. Den Vorsitz hatte I. Gulyas aus Ungarn, Vizepräsident von IFEF, der Internationalen Eisenbahn-Esperanto-Föderation. Er berichtete zunächst über den Verlauf des vergangenen 42. Kongresses der Eisenbahner-Esperantisten im Juni 1990 in Hamar/Norwegen. Danach informierte P. Chrdle aus der CSFR die Anwesenden über die Planungen für den nächstjährigen Kongreß.

Vom Vorstand des Esperanto-Weltbundes

(UEA) war O. Princz anwesend, dort verantwortlich für länder- und fachspezifische Fragen. Er unterstrich in einer kurzen Ansprache den Wert weiterer Zusammenarbeit zwischen den Organisationen aus den Ländern und den fachlichen Esperanto-Organisationen.

Während der Zusammenkunft wurden 2 Fachvorträge gehalten. Zunächst erläuterte I. Gulyas die Situation und die Entwicklung des Eisenbahn-Personenverkehrs in Europa. Danach sprach Dr. I. Ferenczy (Ungarn) über die Aufgaben von Eisenbahn-Fachärzten bei schweren Erkrankungen von Eisenbahnern. Mehrere Anwesende diskutierten danach über organisatorische Angelegenheiten der Eisenbahner-Esperanto-Bewegung.

Walter Ullmann

Ungarn: Hochkonjunktur für Esperanto als Schulfach

Esperanto bietet immer mehr Möglichkeiten zur Anwendung.

Immer mehr Schüler aus Ungarn wählen Esperanto als Schulfach, seitdem der Russisch-Unterricht aus den Stundenplänen so gut wie verschwunden ist. Schüler an Gymnasien müssen in Ungarn nach wie vor zwei Fremdsprachen erlernen, und da wird die Kombination Englisch und Esperanto immer beliebter. Engpässe gibt es ab und zu unter den Lehrern, die Zahl der ausgebildeten Esperanto-Lehrer hält nicht mit der Nachfrage der Schüler mit; ähnlich ist es im Englisch-Unterricht.

Auch schon vor dem politischen Wandel in Ungarn wurde Esperanto in vielen Schulen unterrichtet, aber erst seit kurzem ist es gleichberechtigtes Fach im Fremdsprachenunterricht. Esperanto-Lehrer Ernő Csiszar aus dem Städtchen Varpalota berichtet, daß seine Schüler besonders begeistert sind, wenn Gäste aus dem Ausland in den Unterricht kommen. So besuchte kurz vor den Sommerferien ein Lehrer aus Südkorea die ungarischen Schüler, und unterhielt sich mit ihnen in Esperanto. Außerdem nutzen die Schüler die Sprache durch Briefkontakte und gelegentlich bei Reisen ins Ausland.

(aus esperanto informationsdienst)

Egon Kiefer

Überprüfen Sie bitte das Anschriftenverzeichnis in Nr. 1/90, Seite 8. Veränderungen bitte umgehend dem Schriftleiter mitteilen, da die redigierte Neufassung im Bulteno 1/91 erscheinen soll.



Arbeitsitzung JV in Aachen 1990

Foto: Terjung

El Esperanto aktuel

Ĉi-foje **Esperanto aktuel** kompreneble havas la politikan **unuiĝon** kiel plej gravan temon, ĉar ĉi-tiu numero estas la unua, kiu aperas en la nova, nun tute libera kaj suverena **Germanujo**. Tio estas historia evento, kiun ankaŭ Esperantujo ne neglektu, Kontraŭpruvitaj estas la timoj de la ekstremaj maldekstruloj en okcidento, ne tuŝi eĉ maljustajn limojn en Eŭropo, ĉar povus forigi ilin nur milita perforto: La Hungaroj batis la unuan breĉon en la muron, kaj la senperfortaj manifestacioj en orienta Germanujo faligis ĝian reston. Kion milionoj da pacmovadanoj el ĉiu politika aŭ mondpercepta direkto postulis antaŭ kelkaj jaroj, tio realiĝas nun paŝon post paŝo: neniigo de amasekstermiloj, reduktiĝo de armeoj kaj militbuĝetoj, retiriĝo de soldatoj el fremda teritorio.

Liberan Germanujon neniu devas timi. Ĝuste la Germanoj dolore lernis el la historio, ke naciismo estas eksmoda kaj danĝera. Nun-

tempe certe releviĝos naciismaj tendencoj, sed nur interne de malgrandaj reakciulaj rondoj, kiuj manke de intelekto kaj saĝeco havas nur tiun malvastan perspektivon. La forte enradikiĝinta demokratio en Germanujo eltenos fojajn atencojn de radikaluloj; regas la profunda deziro, iĝi membro en la popola familio en unuiĝonta Eŭropo, tiel ke la Germana unuiĝo — kvankam grava — estas rigardata nur unu paŝo al tiu supernacia celo. Post la festado venas ankaŭ la sobriiĝo: politika libereco ne sufiĉas. Devas ankaŭ realiĝi ekonomia bonfarto en la landoj, kaj tio ne rajtas signifi nur konsumadon. La politika revolucio en la orientaj ŝtatoj devas esti la komenco de tut-Eŭropa, pli bone tutmonda, **ekologia revolucio**, ĉar sen tiu multaj landoj ekster Eŭropo, kaj fine ankaŭ Eŭropo mem, ne havos estonton!

Ni Esperantistoj facile povas daŭre ripeti por ni, ke nia celo estas nur la disvastigo de Esperanto. Sed ĉiuj grandaj celoj de la homaro estas interplektitaj. Al malsata homo vi ne daŭrigo: p. 8

ak aŭrigo de pâge 7

povas prediki pri sendiskriminacia interkomunikado, kaj homoj, kiuj ne plu havas purajn akvon kaj aeron, ne sentas bezonon de internacia lingvo. Tial ni restu modestaj konsciante, ke nia solvo de la lingva problemo estas nur unu — kvankam necesa — antaŭkondiĉo, ataku la ceterajn, bazajn problemojn mondvaltajn.

La Germanoj ne forgesos la najbarojn kaj la mondon pro la nuna realiĝo de siaj revoj. Ankaŭ en Esperantujo du unuiĝontaj landaj movadoj povos konduki al pli alta nivelo de por-Esperanta laboro.

Hedwig kaj Rudolf Fischer

Über den IFEF-Kongreß und Nachkongreß in der Tschechoslowakei

Es sind Klagen zu hören, daß die Preise, die im Anmeldevordruck für den 43. IFEF-Kongreß gefordert werden, zu hoch seien. Es ist zuzugeben, daß der Kongreßbeitrag mit etwa 96 DM höher als bisherige derartige Beträge liegt. Das hängt jedoch von der augenblicklichen Situation in der CSFR ab. Außerdem handelt es sich dabei um eine **einmalige** Ausgabe.

Die Preise für Hotelzimmer sind, verglichen mit den hiesigen, keineswegs als überhöht zu bezeichnen.

Da die Brünner Messe zeitlich verlegt worden ist, mußte ein neuer Kongreßort gesucht werden. Der 43. IFEF-Kongreß wird daher in der vorgesehenen Woche vom 11. bis 17. Mai 1991 in Olomouc (Olmütz) in Nordmähren stattfinden. Bitte „Internacia Fervojisto“ beachten! Darin wird auch ein aktualisiertes Aliĝilo erscheinen. Wer sich schon angemeldet hat, braucht sich nicht nochmals anzumelden. **Voraussichtlich** können in Olmütz alle Kosten — außer dem Kongreßbeitrag — vor Ort bezahlt werden.

Was man vor allem beachten sollte, ist die Feststellung, daß die allgemeine Lebenshaltung in der CSFR infolge des vorteilhaften (offiziellen) Tauschkurses der DM für uns außerordentlich preiswert ist. Verkehrsmittel, Speisen, Getränke und andere Artikel sind sehr billig. Eine Mahlzeit im Restaurant ist für 3 bis 5 DM zu haben, ein Bier (1/2l) kostet etwa 70 Pf., in Geschäften noch weniger. Der Aufenthalt für die gesamte Kongreßwoche ist daher weit billiger als in anderen Kongressen. Der Kurs für 1 DM lag im Oktober bei etwa 20 Kronen. Er wird laufend der Inflation angepaßt.

Noch günstiger sind die Bedingungen für den Nachkongreß in der Slowakei (Žilina), für den nur der bescheidene Betrag von 25 DM vor auszuzahlen ist. Alles andere ist ebenfalls vor Ort zu begleichen. Die bekannten Naturschönheiten der Slowakei und die für die Ausflüge vorgesehenen Ziele lohnen die Teilnahme auf jeden Fall. Aber bitte beachten, daß die Teilnehmerzahl begrenzt ist und nach Ablauf der Anmeldefrist LKK die Annahme der Anmeldung nicht garantieren kann. Gi

Termine

- Frühjahrestreffen Arbeitsausschuß + Beauftragte Fulda 16.3.1991
- Seniorentreffen Minden a.d. Weser 18.4.1991
- 43. IFEF-Kongreß Olomouc (Olmütz) 11.5. bis 17.5.1991 und Nachkongreß 18.6. bis 25.6.1991 in Žilina/Slovakio
- Jahresversammlung Friedrichshafen vom 11. - 13.10.1991
- 44. IFEF-Kongreß in Münster/Westfalen 16.5. bis 22.5.1992
- IFES Les Contamines-Montjoie/Frankreich 2.2. bis 9.2.1991.

1992 findet die Skiwoche in den Biskjeden/Slowakei statt.

Die BSW-Mitteilungen bei den meisten Direktoren sind ein geeignetes Mitteilungsblatt für unsere Veranstaltungen. Es wird gebeten, hiervon regen Gebrauch zu machen. Bei der Redaktion sind die Ausgaben 2/90 aus Essen, Frankfurt/Main und Nürnberg eingegangen.

Redaktfino por n-ro 1/91 estas la 15. 1. '91

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝolĝan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Herausgeber/eldonanto Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks. Frankfurt (Main). Schriftleitung /redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck/preso: Druckerei Jungfer, 3420 Herzberg am Harz